



LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Grafdijk (NH), Nederlando
 Ĝironumero 382363 Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

ESPERANTO EN LERNEJOJ.

Daŭre mi ricevas „sugestojn” de eŭropaj korespondantoj pri la temo kiel enigi Esperanton en la lernejojn. Ĝis nun neniu el tiuj „sugestoj” estis eĉ ete valora. Tion spertas ĉiuj esperantistoj en Usono, ne nur mi. Se iu instruisto aŭ helpemulo, leginte ĉi tiun artikolon, havas iujn ideojn, nepre skribu al ni; ĉar ili estas ege bezonataj!

1. Kiel oni povas konvinki usonanojn, ke estas bezono por Esperanto? Ĉe lernejoj la unua demando estas ĉiam: „Kie oni nun instruas Esperanton?” kaj poste venas respondo de la lernejistoj: „Nu, la eŭropanoj eble bezonas internacian lingvon, estas tiom da lingvoj tie. Sed kial ni lernu ĝin?” Kion respondi? Preskaŭ ĉiuj en Usononieniam foriris al alia lando (esceptante Kanadon). Do el lernejo eble nur unu aŭ du personoj vojaĝis eksterlanden. Naŭdek naŭ el cent el ili raportas, ke la angla lingvo tute sufiĉis tra tuta Eŭropo. El la aliaj el cent (= 1) eble duono raportas, ke la angla lingvo kaj eta scio pri la franca aŭ hispana lingvo sufiĉas. La alia duoneto, kiu raportas iun bezonon por internacia lingvo, neniel povas influu lernejojn. Kiel oni povas refuti amikojn, kiuj deklaras, ke ili vojaĝis tra la tuta Eŭropo, neniam bezonante iun lingvon krom la anglan?

2. Kiel oni povas konvinki usonanojn, ke Esperanto ekzistas? Raportoj pri la morto de Esperanto ne aperas en Usono — ili ne estas bezonataj. Laŭ la opinio de preskaŭ cent kvindek milionoj da usonanoj Esperanto tutmortis ĉirkaŭ la jaro 1905. Certe antaŭ la unua mondmilito. Serioze instruistoj deklaras, ke Esperanto estas neparolebla, neskribebla. Kiel oni povas pruvi la ekziston de Esperanto? Radiodissendoj esperantaj ne aŭdeblas; libroproduktado tutjara de Esperantujo egaliga al tiu dum unu tago en Usono; gazetoj estas plejparte nur folietoj kun nur kelkcent abonantoj. En Usono al la popolo gravas ne la kvalito, sed nur la kvanto. Usonanoj povas montri multajn anglalingvajn ĵurnalojn kaj librojn eldonatajn en eŭropaj landoj. Do, kial ni havu Esperanton?

3. Instruistoj ĉi tie ne estas konvinkitaj, ke naciaj lingvoj ne estas perfekte instrueblaj. „Iom pli da tempo por instruado,” ili diras, „kaj ne estus problemoj.”

Do, estas preskaŭ miraklo, ke iu ajn ĉi tie lernas Esperanton. Kial mi lernis ĝin? Ĉar mi multe ŝatas ĝin kiel lingvon. Ĉu ĝi iam iel utilis al mi kiel vojaĝilo, kontaktilo k.t.p.? Verŝajne ne. Se jes, ne per iu maniero klarigebla al lernejoj.

Do, mankas iu ajn instigo por Esperanto en lernejoj. Post konvinko pri bezono por Esperanto, oni devus baraktadi kontraŭ tempomankoj, k.t.p. Sed bedaŭrinde ni ankoraŭ ne atingis tiujn problemojn. Kaj verŝajne ni neniam ja atingos bezonon atenti tiujn problemojn. Ĉu eble iu havas iujn praktikajn sugestojn?

Donald R. Broadribb, 791 South Ave, Rochester 20, New York, Usono.

KELKAJ FAKTOJ PRI JUGOSLAVUJO.

(Ĉi tiun artikolon verkis por L.J.V. slovena studento-ne-esperantisto, por helpi niajn samideanojn, kiuj tiel ofte ricevas petojn: „Skribu ion pri via lando”. Jen la respondo, eble iom profesorstila kaj seka, sed tamen enhavanta la ĉefajn geografiajn faktojn pri Jugoslavujo. Tiu, kiu deziras ekscii pli interesajn aferojn pri nia lando, ilustritajn per belaj bildoj, skribu al la Junulara Sekcio de Slovenia Esperanta Ligo, Cankarjevo nab. 7/1, Ljubljana, kiu peros al li (ŝi) la korespondantojn. — Tradukinto D.B.).

La Federacia Popola Respubliko Jugoslava estiĝis dum la dua mondmilito. En la akra, sanga batalo kontraŭ la faŝistaj okupantoj la popolamasoj per sia nacia armeo liberigis la patrujon. Tiu batalo rezultigis novan Jugoslavujon, kiu forigis la dinastion kaj la estintan estraron por ordigi sin surbaze de la egalrajteco de ĉiuj jugoslavaj nacioj. Jugoslavujo nun estas dividita en ses aŭtonomiajn respublikojn: Serbio, Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino, Slovenio, Montenegro (Crna gora), Makedonio. Post la anekso de Slovena Marbordlando kaj Istrio (tio estas slovena kaj kroata teritorio, kiu dum 25 jaroj estis sub Italujo) Jugoslavujo havas 256.000 km² da teritorio. Ĝi do apartenas al la grupo de mezgrandaj ŝtatoj de Eŭropo. Ekster Jugoslavujo restis Libera Triesta Teritorio (700 km²), kies loĝantoj, vivantaj ekster la urbo Triesto mem, estas ĉiuj slovenoj.

Sur la teritorio de la nuna ŝtato formiĝis kvin memstaraj nacioj: Serboj, Kroatoj, Slovenoj, Makedonoj kaj Montenegranoj. La Kroatoj kaj Slovenoj estis konstante influataj de la Okcidento, tial ili akceptis la katolikan religion kaj latinan skribon. Inter la aliaj jugoslavaj nacioj estis pli forta la influo de la oriento, ĉe ili ankriĝis la grek-ortodoksa religio kaj parte la islamo. Skribante ili uzas la „cirilicon” (t.e. la skribo uzata ankaŭ de Bulgaroj, rusoj kaj ankoraŭ kelkaj sovjetunianaj nacioj).

La nova Jugoslavujo havas ĉirkaŭ 16 milionojn da loĝantoj. Inter ili estas unu miliono kaj duono da Slovenoj. Krom la jugoslavaj nacioj loĝas sur nia teritorio grupoj apartenantaj al la nacioj hungara, rumana, albana, slovaka kaj itala.

La kerno de la loĝantaro estas ankoraŭ ĉefe kamparana, kvankam la lasta postmilita popolnombro montris rapidegan kreskadon de la urboj, kio estas la konsekvenco de la forta alfluo de la provinca loĝantaro al la fabrikoj.

Por la kultura leviĝo de la popolo troviĝas universitatoj kaj atlernejoj en Beograd, Zagreb, Ljubljana, Serajevo kaj Skoplje.

La popolestraro enkondukis planan ekonomion. Tiucele ĝi faris fundan agroreformon, naciigis grandajn ekonomiajn entreprenojn privatajn kaj ekprotektis ĉiujn naturajn riĉaĵojn. Specialan atenton oni dediĉas al la elektrigo kaj industriigo de la ŝtato.

Multaj minoj troviĝas en la lando: karbo, nafto, fero, zinko kaj eĉ iom da oro kaj arĝento.

Nuntempe konstruiĝas en Jugoslavujo forta „peza” industrio, pro la ekonomia kaj defenda fortoj de la ŝtato, kiuj ĉefe dependas de la ferproduktado kaj maŝinindustrio.

Por la fremdultrafiko Jugoslavujo havas bonajn naturkondiĉojn. Ĝi estas la sola inter la slavaj ŝtatoj, kiu havas larĝan aliron al la varma suda maro Adriatika. La plej bonaj libertempejoj troviĝas en la suda parto de la montenegra marbordo, apud Ercegnovi kaj ĉirkaŭ Dubrovnik.

Allogaj estas ankaŭ la montaraj libertempejoj kaj sanigejoj en la freŝa monta aero. La slovenaj montoj estas la plej altaj, arbaroriĉaj kaj freŝaj. Krome la slovena montaro estas ekonomie la plej aktiva parto de Jugoslavujo. Ĝin trairas internaciaj vojoj el Mezeŭropo al Adriatiko, el Mez- kaj Okcidenteŭropo al Balkano kaj la Proksima Oriento.

En la ekonomio havas gravan rolon la frukt- kaj vinkulturado. Konataj estas niaj altkvalitaj pomoj kaj prunoj kaj bonegaj (precipe dalmataj) vinoj. La Panonia ebenaĵo estas nia plej riĉa grenregiono (tritiko kaj maizo). Slovenio rikoltas multajn terpomojn, la sudorientaj partoj liveras kanabon kaj kotonon. Tabako kreskas en ĉiuj respublikoj, escepte de Slovenio. Multaj estas la olivarboj kaj figuoj. Sur la suda marbordo oni rikoltas eĉ citronojn kaj oranĝojn.

Niaj urboj laŭ sia ekesto estas sufiĉe malsimilaj. Ĉe la vojkruciĝoj evoluigis: Beograd, Zagreb, Ljubljana, Serajevo, Skoplje. Apud oportunaj golfoj ekestis gravaj havenoj: Rijeka (Fiume), Split, Ŝibenik, Dubrovnik, Kotor.

Ĉiuj menciitaj cirkonstancoj: abundaj naturriĉaĵoj, naskiĝanta industrio kaj kreskado de la urboj prezentas al ni bonajn kondiĉojn por ekstera komerco. Kaj efektive Jugoslavujo, precipe lastatempe, evoluigis viglan komercon kun ĉiuj ŝtatoj, kiuj estimas niajn ekonomian rilaton kun la orientaj ŝtatoj, kiuj mem per sia kontraŭjugoslava blokado malebligas ĝin. Nu, per tio ili pli malutilas al si ol malhelpas al ni

Dane Hribersek, trad. Davorin Bazec (studento de romanistiko).

ARTIKOLOJ KAJ NEŬTRALECO.

..... La vorto NEŬTRALECO — laŭ mia opinio — devigas la redaktorinon, la estraron, la organizon, esti neŭtrala, t.e. supertendeca, rilate al la nomitaj konceptoj. Sed tio certe ne povas signifi, ke ni ne rajtas diskuti pri iu

ajn religia, nacia aŭ politika temo. La aŭtoro de la artikolo jam menciis, ke ja ĝuste la plej interesaj kaj pli allogaj temoj iel rilatas al tiu aŭ alia koncepto. „Supertendenca” devas havi la signifon, ke ni ne trudu nian propran opinion al aliaj, ke ni ne misuzu la eblecon, povi diskutadi tiajn temojn por propagandaj celoj por tiu aŭ alia direkto. Se ni pritraktas la vivkondiĉojn de junuloj, la leĝojn, kiuj malebligas troan ekspluatadon (kiuj en ĉiuj landoj povas esti malsamaj aŭ eble tute ne ekzistas), se ni ekzamenas la ekonomiajn faktojn, se ni esploras la eblecojn por plibonigado de nia vivnivelo, ĉu ankaŭ tio ne estas iaj politikaj temoj? Ili ne estas parti-politikaj temoj, sed ili estas pritraktataj ĉiutage en la parlamentoj, kie ja sidas nur politikistoj. Kaj ĉar ĉiu el ni ĉiutage estas forte ligita al la vivo, kiu estas influata de iaj politikaj decidoj, de leĝoj, kiujn faras la politikistoj, de impostoj, kiujn ni pagas kaj pri kiuj decidas la politikistoj k.t.p., ĉu ni do fermu la okulojn antaŭ tiuj faktoj kaj diru simple: „Ni estas supertendencaj kaj ne rajtas menci tiujn temojn, ĉar ili rilatas al politiko?”

Ni ne senbride insultu pri tiu aŭ alia politika sistemo, ni ne devigu niajn kunvivantojn kredi tion, kion ni kredas, ni ne naive kredu, ke nur unu vojo kondukas al Romo. Ni diru nian opinion sincere kaj nefanatike. Ni pripensu, ĉu ni ĉiuj estas homoj, en kies koro sin kaŝas la arda deziro al feliĉo kaj harmonio sur ĉi tiu tero.

Ju pli vasta fariĝas nia horizonto, des pli multflanka estas la ebleco riĉigi kaj pligustigi nian scion, des pli rapide la homoj atingos la centron, al kiu ni ĉiuj celas, al tiu centro, en kiu ni kune staros mano en mano.

Se la aŭtoroj kapablas diri siajn opiniojn pri iaj „tendencaj” temoj per decaj vortoj, per neofendaj frazoj, se ili klopodos instigi la junularon al memstara pensado kaj se per tiaj artikoloj „La Juna Vivo” fariĝus vere interesa organo de nia organizo, ni povus esti tre kontentaj.

W. F. Poppeck, Oberkirch/Baden, Germanujo.

ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.*.)

Ankoraŭ ofte okazas, ke francoj sin direktas al la antaŭa ĉefperanto. Ni refoje atentigas, ke la nuna ĉefperanto estas Daniel Luez, Lycée, Laon (Aisne), poŝtĉekkonto: Paris 312255.

Landaj bultenoj aperis en Belgujo (jam la 2-a!) kaj en Nederlando.

Estas nia intenco okazigi unu aŭ pli da debatoj dum la kongreso en Ry. Por ke ĉiu havu la okazon prepari sin por la diskutoj, antaŭe aperu en L.J.V. referato pri la pritraktota temo. Tiucele ni petas ĉies kunlaboron: elektu interesan temon, verku pri ĝi artikolon kaj sendu ĝin kiel eble plej baldaŭ al la redakcio. Jen okazo, kiu ebligas al ĉiu kontribui al la kongresa programo!

Al tiuj ĉefperantoj, kiuj ĝis nun ne sendis detalan financon raporton (ĝeneralan kaj landan), ni urĝe petas tuj fari tion, por ke la ĉefestraro havu bonan superrigardon pri la financa stato. Sendu la raportojn al T.J.O.-Centro.

KANTETO BELSONA.

Muziko kaj teksto de Sibe Sipke de Jong Dzn.

1 = Bb, 3/4

Bb¹⁾ C⁷ F⁷ Bb^{7min} Bb

||: 5 | 5 i i | i 3 3 | 2 2 1 2 i | 6. i | 7. 8 7 | 3 2 7 | 6.. | 5.: |

1 A - mik-oj, kun-kant-u, jen gaj-a kant-me-lo-di'! Ĝi taŭg-as por ludo kaj kant - o
2 Ĉu sol-a, du - op - a, per tri aŭ eĉ multe pli, Gaj-ec-on al

² C⁷ F⁷ Bb Eb Bb C⁷

| 3 3 2 | i.. | i 0 i | i 4 4 | 4 i 2 | 3.. | i 0 3 | 2 1 2 3 2 i |

kor' don-as ĝi - - - Kaj lern-i ĝin estas fac - il - e: Ni kant-is ĝin post unu-

F⁷ Bb C⁷

| 6 8 6 7 i 2 | 3.. | 2 0 5 | 5 i i | i 3 3 | 2 2 1 2 i | 6. 3 |

foja aŭdo tre trankv- il - - e. Do ven-u, a - mik-oj, jen gaja kant-me-lo-di' Kaj

F F⁷ Bb C⁷

| 2 1 2 3 2 1 | 2 3 4 | 5.. | 5 . 5 ||: 3. 2 3 | i 5 3 | 2 1 2 | 6. i |

kant-u ĝin en harmoni - o kun ni - -: 1 Kant-et - o bel-son-a tre plaĉ-as al ni; Ni
igas, gaj- igas nin la me-lo-di'; Ni

F⁷ Bb^{7min} Bb C⁷ F⁷ Bb Eb

| 7. 8 7 | 3 2 7 | 6.. | 5. 5.: ||: 3 3 2 | i.. | i. i | 4. 3 4 | i 7 i |

vol-as ĝin lud-i kaj kant-i. Vigl- tuj fam-i-li' - - Gaj-ig- a kant-ad-o konsentas nin

Bb C⁷ F⁷ Bb

| 3. 2 3 | i 3 | 2. 1 2 | 6. 7 i | 3.. | 2. 5 | 3. 2 3 | i 5 3 |

ven-as al kor': Ni pov-as for-ge-si la zorg- ojn. Kant-et-o bel-son-a en

C⁷ F⁷ C⁷ F⁷ Bb F Bb

| 2. 1 2 | 6. i | 7. 8 7 | 3 3 2 | i. 5 | 5. ||

dom' aŭ sur voj' Plen-ig-as la kor-ojn per ĝoj'. A-hoj'!

1) Basliteroj por gitaroj, akordionoj k.t.p.


Korekto: Sur paĝo 36-a de LJV staru en la kanto post la majusklo B ne la minusklo b, sed la muziksigno bemolo: b

La komenco de la kanto estu: || 3 4 | 5 6 5. 0 i 2 | 3 4 3. 0 4 3 |

Al la 8-a I.J.K. (Ry, Danujo).

La nederlanda junular-vojaĝoficejo R.O.Y. aranĝas regule aŭtobusvojaĝojn de Utrecht al Arhus je tre favora prezo: 60 guld. tien kaj returne. Vojaĝdaŭro ĉk. 16 horoj. Nederlandanoj kaj eventuale eksterlandanoj, kiuj deziras partopreni tiun ĉi vojaĝon, anoncu sin kiel eble plej baldaŭ al la sekretario en Delft, samtempe sciigante, ĉu ili deziras revojaĝi tuj post la kongreso aŭ restadi ankoraŭ duan semajnon. La vojaĝo okazos je la dato elektita de la plimulto. Se anoncos sin sufiĉe multaj, la aŭtobuso veturos rekte al Ry.

Huĉ Ringbeck, Köln-Sülz, Redwitzstr. 12, Germanujo, intencas iri bicikle al Ry. Li foriros el Kolonjo la 27-an de julio. Li manĝos kaj dormos en junulargastejoj (kostoj pr. 4 germ.m.tage). Li ellaboris tre detalan vojaĝplanon. Kiu deziras kunbicikli do skribu al la supra adreso.



Ry, Altlernejo.

ĜENERALAJ INFORMOJ.

Internacia Skirenkontiĝo en Titisee, Sudgermanujo. De la 27-a de dec. ĝis la 1-a de jan. '52-a okazis en Titisee en Nigra Arbaro internacia skirenkontiĝo. Partoprenis dudeko da gejunuloj el Danujo, Francujo, Germanujo kaj Svisujo. Invitinto estis la ŝtatsubvenciata organizaĵo Esperanto-Junularo de Badeno.

Okazis belegaj ekskursoj kaj skiado sur la monto Herzogenhorn (1400 m).

Dum du vesperoj diverslandaj dokumentarfilmoj estis montrataj, i.a. la filmo „Danlando” kun tekstoj en Esperanto.

La plimulto de la partoprenantoj estis studentoj aŭ altlerneĵanoj kaj pro tio la dana delegacio aranĝis „rondtablan konferencon” pri studmanieroj en Danujo. Krome oni diskutis pri „La filmo en la vivo de junaj homoj” kaj pri „Ĉu kaj kiel ni povos atingi unuigitan Eŭropon?”. La novjara vespero kompreneble estis tre vigla en tia internacia junulara medio. — La 1-an

de januaro la partoprenantoj disiĝis, ĉiuj tre kontentaj pri la bone aranĝita renkontiĝo.

Johs. Vesterland-Andersen, Köbenhavn, Danujo.

Internacia kurso. Antaŭ tri jaroj okazis en Viskdalen, Svedujo, internacia kurso pri la temo „Sveda Socia Strukturo”. Pro ĝia granda sukceso la Sveda Esperanto-Instituto nun decidis aranĝi novan internacian kurson pri la temo „La nuntempa Svedlando”. Ĝi okazos en la altlernejo Bohusgården, apud Gotenburgo, de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto '52-a. La sveda registaro subvencios per 4.000 kronoj. — La prezo de la kurso estos 75 sv.kr. (por la instruado, loĝado, manĝaĵoj kaj ekskurso al Gotenburg. Povos partopreni maksimume 25 personoj. Informojn donas Helmer Almén, Sveda Esp. Federacio, Tegelbacken, Stockholm, Svedujo.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ. 1)

Bagatelaro: 15 prozaĵoj kaj 6 versaĵoj, originale verkitaj de Johan Hammond Rosbach. 174-paĝa, bonaspekta libro, eldonita de Esperantoforlaget A/S, Oslo, Norvegujo; prezo (afr.) 4,25 guld.

En sia „averto” la aŭtoro skribas, ke la libro precipe volas doni relative facilan kaj simplan legaĵon al tiuj, kiuj ne plu estas „puraj komencantoj”. Tamen esperu ni, ke la verko atingos multe pli vastan legantaron, ĉar tion ĝi meritas. En la, laŭ enhavo, tre variaj prozaĵoj kaj spritaj versaĵoj, ĉiu ja trovos ion laŭ sia gusto. Lingvo kaj stilo estas bonaj kaj simplaj. Bedaŭrinde estas kelkaj ĝenaj preseraroj, sed cetere ankaŭ la preso estas bona.

La Hundo Kruso, de R. M. Ballantyne, tradukita el la angla lingvo de J. M. Inman, 150 p. broŝ. libro, eld. de The Esp. Publishing Co Ltd., Rickmansworth, Anglujo; prezo (afr.) ŝ. 3/3 (guld. 1,75).

Streĉa rakonto el la malproksima Okcidento, el la regiono de la sovaĝaj stepoj kaj bestoj, rokaj montoj kaj — indianoj. Tri ĉasistoj en Norda Dakoto en Usono iras kiel agentoj de la registaro al najbaraj indianaj gentoj por akceli pacon. Unu el ili, Rik, kunportas sian mirinde inteligentan hundon Kruso, kiu ludas gravan rolon en ĉiuj aventuroj kiujn ili spertas inter la indianoj.

La Esperanta eldono estas mallongigo de la originala rakonto, kiu aperis en 1860-a. Kvankam ĝenerale la lingvo estas bona, ni tamen renkontis kelkajn neperfektaĵojn, lingvajn kaj stilajn, facile eviteblaj.

Rui Barbosa, de Fernando Nery, el la portugala lingvo tradukita de Jozefo Joels. Grandformata, ilustrita, 290-p. libro, eld. de Brazila Ministerio de Edukado kaj Sano, pere de Casa de Rui Barbosa, Rua São Clemente 134, Rio de Janeiro, Brazilo. Bedaŭrinde la prezo ne estas indikita.

Biografia eseo pri Rui Barbosa (1849-1923), juristo kaj politikisto, unu el la plej eminentaj figuroj de la Brazila historio. Certe ĉi tiu instrua libro, kun multaj citaĵoj el prelegoj, libroj kaj leteroj de la eminenta Brazilano estas gajno por nia literaturo. Lingvo kaj stilo estas bonaj. Sed la verko estas ankaŭ propagando por la oficialigo de nia lingvo. Pro tio la Brazila Esperanto-Ligo urĝe petas al ĉiuj samideanoj kaj grupoj sendi gratulleterojn

1) Ĉiujn librojn oni povas mendi al la T.J.O.-Libro-Servo, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando.

(adr.: Praça da República 54-1, Rio de Janeiro). Per tiuj leteroj la Ligo volas montri al la Ministerio (kiu ja bonvole eldonis la libron) la disvastigon de nia movado.

La vojo al daŭra paco kaj ĝenerala prospero, 4-p. broŝuro kun la deklaro de principo kaj politiko de la Sepa Intern. Kongreso por Progresigo de Tervalora Impostado kaj Libera Komerco, 4 Great Smith Str., London S.W. 1, Anglujo. Senpagaj ekz. estas haveblaj ĉe la supra adreso.

Bulteno de Perioda Esperanto-Infoservo de Int. Grupo Esperantista de Morala Rearmado, Köge, Danujo. Certe la intencoj de la verkintoj estas bonegaj, sed bedaŭrinde la bulteno enhavas tiom da lingvaj eraroj, ke ĝi estas malbona propagandilo por la movado.

Naskiĝo de la Universalista Kredo, 8-p. broŝuro, verkita kaj eldonita de E. Lambert, Esperanto-Book Service of America, 114 W. 16 St., New York, N.Y., Usono; prezo 2 resp. kup. — La historio pri la fondiĝo de la universalista Kredo kaj pri ĝiaj pioniroj Potter kaj Murray.

KORESPONDADRESOJ.

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Aŭstralio: B. Kostinek, c/o Letter Delivery G.P.O., Sydney, dez. interŝ. afr. il. poŝtk. k. Francujo, Svisujo, Italujo kaj Ĉeĥoslovakujo.

Aŭstrujo: Du 13-j. lernantinoj dez. kor. kun samaĝa ned. knabino. Skribu al Inge Sebr kaj Babicka Lotte, Abelegasse 29, Wien 16.

Britujo: 14-j. junulo, Derek Ulrich, 127 Wood Lane, Dagenham, Essex, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. garantiata.

Bulgarujo: Atanas Chterev kaj Steffan Charcanzov (20-j. bankoficistoj), str. Moskva 67, Bourgas, dez. interŝ. pm., poŝtk., revuojn, k.t.p.

Stojan Kostadinov, str. Totinov 38, Burgas, dez. kor. per pk., interŝ. bildk., (sport)gazetojn, muzikon, fotojn k.t.p.

Ĉeĥoslovakujo: E. K. Litvinov ar. letervesperon je 31-3-'52. Ĉiu ricevos resp. k. foton. 20 geklubanoj dez. kor. k. ĉ. l. (aĝo 10-35-j.) Adr.: J. Pastor, Rooseveltova 646, Litvinov 1.

Francujo: 15 lernantoj 14-17-j., de la Verda Klubeto, Collège „Turgot”, 69 rue Turbigo, Paris 3-me, dez. kor. k. gelernantoj aŭ gekomercoficistoj.

Germanujo: Mi dez. interŝ. k. ĉ. l. pm, Esp. poŝtstampojn, glumarkojn, kongresinsignojn, mon- k. veturbiletajn, ktp. A. Neussner, Wollankstr. 79/80, Berlin N 20.

Nederlando: La sekvontaj 6 lernantoj ricevis por Esperanto kiel premion jarabonon je „La Juna Vivo”: W. H. Dröge, Rotterdamse dijk 272, Schiedam; J. v. d. Horst, Valkenboslaan 6, den Haag, E. v. Hofwegen, Karmelksloot 203, Gouda; A. de Jong, Bovenberg D 120, Berg Ambacht; J. Groeneveld, 1ste Barendrechtse laan 16, Oegstgeest. — Ĉiuj estas lernantoj (15-19-j.) de la mezgrada teknika lernejo en Rotterdam. Instruisto Ing. B. B. de Regt.

Eksterlandaj geknaboj bonvolu sendi al ili simplan leteron aŭ ilustritan poŝtkarton.

Infanaj desegnaĵoj petataj. La Esp. grupo de Angers intencas en Aprilo 1952-a organizi propagandan ekspozicion de infandesegnaĵoj. Sendintoj eventuale povos ricevi desegnaĵojn de francaj infanoj. UNESCO jam promesis sendi propagandilojn. Adr.: F-ino Nouais, 28 Blvd. Descazeaux, Angers, Francujo.